

Deklaro Pri Multlingveco

Decidita De La Ĝenerala Asembleo De Unuiĝintaj Nacioj

94-a plena sesio

15 Februaro, 2002

Unuiĝintaj Nacioj A/RES/56/262

Ĝenerala Asembleo

9-a de aprilo 2002

56-a sesio Punkto 32 de la tagordo 01 49761

Rezolucio de la Ĝenerala Asembleo [sen resendo al granda komisiono

(A/56/L.44/Rev.2 kaj Korek. 1)] 56/262.

Multlingveco

La Ĝenerala Asembleo,

Konsiderante ke la Organizaĵo de Unuiĝintaj Nacioj praktikas multlingvecon kiel rimedon por favori, defendi kaj protekti la diversecon de lingvoj kaj kulturoj mondnivele,

Konsiderante ankaŭ ke la vera multlingveco favoras la unuecon en diverseco kaj internacia interkompreno,

Rememorigante sian rezolucion 47/135 de la 18-a de decembro 1992 en kiu ĝi akceptis la Deklaracion pri rajtoj de personoj apartenantaj al minoritatoj naciaj aŭ etnaj, religiaj kaj lingvaj, kaj la Internacian Pakton pri rajtoj civilaj kaj politikaj[1], kaj speciale la artikolon 27 pri rajtoj de personoj apartenantaj al minoritatoj etnaj, religiaj aŭ lingvaj,

Rememorigante ankaŭ siajn resoluciojn 2 (I) de la 1-a de februaro 1946, 2480 B (XXIII) de la 21-a de decembro 1968, 50/11 de la 2-a de novembro 1995, 52/23 de la 25-a de novembro 1997, 54/64 de la 6-a de decembro 1999, 55/258 de la 14-a de junio 2001, kaj ankaŭ 56/64 B kaj 56/242 de la 24-a de decembro 2001,

I

1. Konstatas la raporton de la Ĝenerala Sekretario[2] kaj rememorigas la proponitajn rimedojn;
2. Notas la nomumon de kunordiganto pri multlingveco;
3. Konstatas kun kontento ke la Sekretariato pretas kuraĝigi la funkciulojn por ke ili uzu dum oficialaj renkontoj kun tradukaj servoj ĉiun lingvon konatan de ili inter la ses oficialaj lingvoj;
4. Substrekas ke la varbado de personaro devas daŭre konformiĝi strikte al la Artikolo 101 de la Ĉarto de Unuiĝintaj Nacioj kaj al la konformaj disponoj de siaj resolucioj;
5. Substrekas ankaŭ ke la promocio de altrangaj administrantoj kaj funkciuloj devas esti strikte konforma al la Artikolo 101 de la Ĉarto kaj al la disponoj de la rezolucio 2480 B (XXIII) kaj al la konformaj disponoj de la rezolucio 55/258;
6. Kuraĝigas la funkciulojn de la Organizaĵo de Unuiĝintaj Nacioj daŭre aktive uzi la ekzistantajn rimedojn de edukado por akiri kaj plibonigi la konon de unu aŭ pluraj oficialaj lingvoj de la Organizaĵo;
7. Konstatas reverkon de la varbadsistemo entreprenita de la Sekretariato en la kadro de la projekto Galaxy, kaj petas la Sekretariaton plejeble rapide ekfunkciigi la sistemon;
8. Rememorigas ke en sia rezolucio 56/242, cele al plibonigo de la servoj de interpretado, ĝi petis la Ĝeneralan Sekretarion, ke li raportu pri la grado de uzado de tiuj ĉi servoj kaj konferencinstaladoj en ĉiuj laŭcelaj lokoj kaj petas la Ĝeneralan Sekretarion komplete ekzameni kaŭzojn kial certaj duonoficialaj renkontoj enskribitaj en la kalendaro okazas sen servoj de interpretado;
9. Rememorigas krome ke en sia rezolucio 56/64 B, ĝi konstatis la strebojn kiujn la Ĝenerala Sekretario, zorgante pri multlingveco, daŭre disvolvas por pligrandigi la kolekton de libroj kaj publikaĵoj de la Biblioteko, kaj ke en la paragrafo 1 de la sekcio V de sia rezolucio 56/242, ĝi petis la Ĝeneralan Sekretarion, ke li prezentu bilancon de la progresoj faritaj en la kampo de uzo de informteknologioj, nome rilataj al terminaraj datumbankoj;
10. Rememorigas ankaŭ sian rezolucion 56/64 B kaj substrekas la gravecon de multlingveco en la agadoj de publikaj rilatoj kaj de informado de la Organizaĵo de Unuiĝintaj Nacioj;
11. Petas la Ĝeneralan Sekretarion ke li prezentu dum la 58-a sesio ĝeneralan raporton pri la apliko de ĝiaj resolucioj rilataj al multlingveco, interalie rilataj al la incidentoj de la sekcio I de la nuna rezolucio;

II

12. Ĝojas ke la Ĝenerala Asembleo de la Organizaĵo de Unuiĝintaj Nacioj pri edukado, scienco kaj kulturo decidis la 17-an de novembro 1999, proklami la tagon de 21-a de februaro "Internacia Tago de la gepatra lingvo", kaj petas Membroŝtatojn kaj la Sekretariaton ke ili kuraĝigu la prezervon kaj defendon de ĉiuj lingvoj parolataj en la tuta mondo;
13. Petas la Ĝeneralan Sekretarion ke li raportu dum la 58-a sesio, pri rimedoj kiujn Membroŝtatoj kaj internaciaj organizaĵoj povas apliki por plifortigi la defendon, la reklamon kaj la prezervon de ĉiuj lingvoj kaj speciale lingvoj parolataj de personoj apartenantaj al lingvaj minoritatoj kaj lingvoj minacataj malaperi;

III

14. Decidas enskribi en la provizoran tagordon de sia 58-a sesio la demandon titolitan "Multlingveco".

(Tradukita de Marko Naoki Lins, de [ĉi tie](#))

[1] Vidu la rezolucion 2200 A (XXI), aldonaĵo

[2] A/56/656. A/RES/56/262 2

Oficejo de Universala Esperanto-Asocio ĉe Unuiĝintaj Nacioj
777 United Nations Plaza, New York, NY 10017.
212-687-7041